

Михаил Юрьевич Лермонтов,
La velo

tradukita de Konstantin Gusev

Blankadas velo unusola
En la nebula mara blu'
Ĉi kion lasis, kion volas
En fremdaj landoj serĉi plu?

Ondiĝas kaj la vento spiras,
Fleksante l'maston kun fervor',
Ve! Ne feliĉon vel' aspiras,
Nek de l'feliĉo kuras for.

Ĝin kovras blua rond' ĉielo,
Sub ĝi lazuras onda spac',
Sed ŝtormon serĉas ĝi ribela,
Kvazaŭ en ŝtormoj estus pac'.

*Traduko de la Rusa poemo “Парус” de Михаил Юрьевич ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-16 – †1841-07-27) en Esperanton de KONSTANTIN GUSEV (†1980-11-09).*

Arg-545-1095 (2010-06-20 17:39:30)

Tiuun ĉi poem-esperantigon mi, Manfred Retzlaff, ricevis en 2010-06-20 de s-ro Yenovk Lazian, Leonhard-Hausmann-Str. 58, D-86157 Augsburg, Germanio. Pri K. Gusev (Константин Михайлович Гусев) vidu ankau la vikipedian paghon http://eo.wikipedia.org/wiki/Konstantin_Gusev.